

# Esperanto-historio : Esplortemo de Ch. Lavarenne

En cxi tiu dokumento mi proponas respondi al jena peto de Mark Fettes :

Necesos iom pli da klareco pri jenaj punktoj:

(...)

2. Vi aludas la neceson limigi vian esplortemon, kaj mi tute konsentas. Necesas ankau rilatigi ghin al aliaj historiaj esploroj. Vi klarigas la "strategian" bezonon de tia tezo, sed ni shatus ankau vidi klarigon de ghia "esplora" graveco. Kian historian demandon ghi prilumos? Kiel aliaj historiistoj, ne konantaj Esperanton, aliris tiun au similajn demandojn? Kian fakan gvidadon vi ricevos pri la temo? Kion novan vi esperas malkovri? Tiurilate ni ankau shatus scii, kiel la esplorado plukonstruos sur via magistrigha laborajho.

Mi komencas per la lasta demando por klarigi la sxangxojn.

La celo de mia unua temo, grandioza sed fakte malfacile plenumbla, estis duobla.

Unue temis pri dauxrigo de la majstra (krom laux euxristika vidpunkto cxar estis multkaza nesuficxa dokumentiteco pri punktoj, kio kondukis al eraretoj) 886-pagxa habilitiga tezo de Prof. Jean-Claude LESCURE<sup>1</sup>, kiu pritraktis (Volapukon kaj) Esperanton gxis la dua mondmilito (cxefe en Francio). Kaj iel dauxrigo ankau de *The E-Movement* de FORSTER (eldono en 1982 de lia doktora tezo defendita en 1977), kaj provo do plenigi ian prihistorian vakuon (cxar ankau *Esperanto en perspektivo* ja ne povas pritrakti la movadon post 1974, gia eldonjaro).

Due, cxar J.C. Lescure demande prezentis (ecx en la titolo) Esperanton kiel "imaginaire transnational", do ian utopian imagaron kiu (laux mia ja karikatura simpligo) atingis sian apogeon antau la unua mondmilito kaj velkis gxis la dua kiu alportis al gxi la finan baton, mi deziris male montri la ioman realecon de Esperanto kaj ties ankorauxan nemorton.

Mi intencis samtempe (sed malcxefe) provi alporti iajn respondajn elementojn al la cxiam de-  
mando "cxu ni progresas ?", unue montrante ke la apogeo movigxas laux la auxtoroj kaj la vidpunktoj :

- antaux la *unua mondmilito* do, laux Lescure (influita de la "franca periodo")
- antaux la *dua mondmilito* laux Pascal ORY<sup>2</sup> :

"Il ne fait pas de doute que les années qui précédèrent la guerre furent celles où les espérantistes purent se croire le plus près du but."

(Opinio dauxre pri la situacio cxefe en Francio, kaj de historiisto *nefakulo* pri Eo.)

- *post la dua mondmilito*, laux la pola historiisto (iama esperantisto kaj eksa ministro) Bronislaw GEREMEK, Profesoro pri Euxropa Civilizacio en la Euxropa Kolegio en Natolin :

"En mia junagxo, tuj post la milito mi estis konvinkita, ke gxuste Esperanto farigxos la instrumento de la interkom-prenigxado de la homoj (...) mi observis, kiel tiam kreskis la signifo de Esperanto en la internacia komunikado. Kaj mi pensas pri unu el la internaciaj organizajxoj UNO kaj gxia institu-cio UNESKO. Esperanto sxajnis tiam havi la estontecon..."<sup>3</sup>

(do versxajne i.a. pro la rezolucio en 1954)

- en la 80-aj jaroj cx. la centjarigxo de Eo ? (ekzemple laux la statistikoj de la UEA-membraro)
- aux ecx. nuntempe ? (i.a. pro la kresko cxe la reto, aux laux la nombro de produktataj originalaj romanoj...)

(Kompreneble tre malfacilus respondi cxar la E-movado aux -kulturo estas multifaceta ; do okazas samtempe kaj progresoj kaj malprogresoj.)

---

1 *Un imaginaire transnational ? Volapük et Espéranto vers 1880-1939* : Dossier de candidature à l'habilitation à diriger des recherches (sous la direction de M. le Professeur Pierre MILZA), Paris : Institut d'Etudes Politiques de Paris ["Sciences-Po"] (Cycle supérieur d'Histoire du XX<sup>e</sup> siècle), 1999, 4 vol., 877 p. ; dont 13 p. sur les sources manuscrites, 77 sur les sources imprimées et 13 de bibliographie.

2 En lia pli ol 1000-pagxa verko pri apenau tri jaroj : *La Belle Illusion : Culture et politique sous le signe du Front populaire 1936-1938*, Plon, 1994, p. 646.

3 Intervjuo, fare de Barbara PIETRZAK, 31.12.2002-17.00 (kaj elsendita la 10-1-2003).

En junio mi renkontis mian esplordirektoron J.C. Lescure, kiu diris al mi kion mi jam ekkonsciis : tro ampleksa temo, kvankam mi ekde la komenco rezignis pri la laborista flanko cxar SAT-ana franca histori-instruistino, A.S. Markov, defendis en 2001 DEA-disertajxon titolitan *Le mouvement international des travailleurs espérantistes des origines à nos jours*<sup>4</sup>. Sxi do teorie preparas doktoran tezon pri tiu temo (kvankam sxi diris al mi ke sxi ege dubas cxu sxi finos gxin).

Koncize, mia tiama plano havis tri cxefajn partojn :

- I - Espéranto et instances (inter)nationales
- II - Culture
- III - Spiritualité et religions [i.a. kiel kernoj de kulturo]

Lescure proponis al mi, pro mia subparto I-3, "stratégie centrée sur l'enseignement de l'espéranto à l'école", studi la historion de la E-lernolibroj (cxar li opinias ke ofte esperantistoj estis pedagogie avangardaj).

Mi ne povis akcepti cxar mi ne sentas min suficxe kompetenta pri tia temo (kvankam mi poste ekkonsciis ke per tiu propono li *eble* deziris sugesti al mi ke mi samtempe kvalifikigxu por eventuala universitata E-instruado ?)

Lia dua propono, elekti la trian parton de mia antauxa plano, respondis al miaj antauxaj universitataj studoj kaj do kompetento.

Mia nova (kaj ankoraux iomete provizora) titolo farigxas :

*Simple outil de communication transnationale ou langue créatrice et reflet de vision(s) du monde ?  
Espéranto, neutralité, "idée interne" et religions*

Do, pli malpli : Nura internacia komunikilo aux [plena] lingvo kreanta kaj spegulanta mondbildo(j)n ? Esperanto, neuxtraleco, interna ideo kaj religioj.

Aux, alimaniere :

***Et pourtant tous samideanoj !***

***L'idée interne de l'espéranto et ses diverses expressions et manifestations des origines à nos jours.***

Kaj tamen cxuij gesamideanoj !

La interna ideo kaj ties diversaj esprimoj kaj manifestigxoj ekde la E-origino gxis nun

Mi eventuale povus forigi la unuan linion kaj subtitole aldoni *kelkajn* vortojn el tiaj : *égalité, justice et paix, tolérance, découverte mutuelle, respect, estime, accueil, empathie, amitié entre les peuples et les cultures...*

interpopolaj kaj interkulturaj (lingva) egaleco, justeco kaj paco, toleremo, reciproka malkovro, respekto, estimo/sxato, akcepto, enpatio (aux simpatio), amikeco...

Tio iel respondus al jena rimarko de Umberto Eco :

"Ni diru ke cxefe gxiaj historio kaj ideologio sxajnas al mi interesaj fenomenoj : tiuj estas gxia nekonata flanko. La homoj perceptas Esperanton cxiam nur kiel proponatan ilon. Ili konas nenion el la idealisma elano kiun animas gxin (...)

Vi devus pli konigi tiun aspekton ! (...)

La historia-ideologia flanko de Esperanto restas absolute nekonata."<sup>5</sup>

---

4 Cxe Univ. Versailles / St Quentin en Yvelines (UFR de Sciences sociales et des Humanités, Département d'histoire), 227 p.

5 Intervjuo, 20-1-1993 en Parizo, fare de Istvan ERTL kaj François LO JACOMO, aperinta en *Esperanto*, n-ro 1045, p. 23. (Kaj dufoje alivorte citita en *La Homo kiu defias Babelon*, L'Harmattan, 2001, p. 9 kaj sur la lasta kovrilpagxo.)

Kaj tio pritraktus aliajn, preskaux netusxigitajn temojn ol la jam studita literaturo (cxefa konsistiganto de kulturo, II-a parto de mia antauxa plano), pri kiu, ekzemple, Margaret G. HAGLER verkis doktoran tezon<sup>6</sup> ; aux ol ankaux grava ero (de la I-a parto de mia antauxa plano) : rilatoj kun Euxropaj instancoj, cxar Alexandre WEBER tre probable komencis cxe la strasburga universitato historian "mémoire [de DEA] sur les espérantistes français et la construction européenne"<sup>7</sup>.

Krom kelkaj pagxoj en biografioj de Zamenhof sxajnas ke la sola nacilingva (aux almenaux franc-lingva) verketo pri homaranismo estas la enkonduko de Pierre JANTON al lia traduko *Le Hillélisme : Projet de solution de la question juive*, de Zamenhof.<sup>8</sup>

Kaj tio plukonstruus sur mia DEA-disertajxo.

En tiaj DEA-verkoj, kiuj en la franca sistemo normale venas post memstara magistra disertajxo kaj estas *nur projektoj* de doktora tezo, kutime estas 3 cxefaj partoj :

- (kritika) priskribo de la jam ekzistanta scienca literaturo pri la temo (en la mia : gxis p. 68) ;
- fontoj, bibliografio, plano ktp. (p. 69-154) ;
- fine, ekzempla pritrakto de unu cxapitro (p. 155-239) ;

kaj mi elektis kiel ekzemplon : "La hiérarchie catholique et l'espéranto".

Cxar katolikismo estas la cxefa grava religio en kiu iel rolis esperantistoj, mi ne estis tute ekster mia nuna temo. Des pli ke mi tiel malkovris ke pluraj katolikaj altranguloj, ekz-e la cxefepiskopo de Milano, sxajnis kompreni la internan ideon, aux almenaux la eksterlingvajn aspektojn de la E-movado :

"Via idealo estas tre kara (...) Via celo efektiviĝos nur tiam, kiam via agado ne restos sur la kampo de la lingvaj aferoj, sed disvastigxos en la praktikan vivon per kristana atesto, frateco kaj karit[at]agado."<sup>9</sup>

(La lasta punkto nuntempe esta realigata de UEA i.a. per "Agado Espero" kaj "Lingvo de paco".)

Alia ekzemplo, de la kardinalo Etchegaray, prez. de la Pontifika konsilio pri Justeco kaj paco :

"Vi amplekse prezentis la mi la idealojn kiuj animas la katolikajn esperantistojn. Temas pri idealoj kiujn la Pontifika Konsilio pri Justeco kaj Paco dividas (...) : estas do kun favoro ke gxi taksas la laboron de cxuij kiuj klopodas por paco, frateco, internacia kompreniĝo kaj komunikado inter la popoloj."<sup>10</sup>

Dua demando de Mark Fettes :

Kiel **aliaj historiistoj, ne konantaj Esperanton**, aliris tiun au similajn demandojn?

Mi tutsimple preskaux ne trovis tiajn historiistojn : la plej gravaj universitatuloj pri Esperanto (FORSTER, D. BLANKE, U. LINS ktp.) estas esperantistoj ; versxajne ankaux Gianfranco CARDONE<sup>11</sup> ?

Kaj ecx J.C. LESCURE, rigardata kiel *la*, tutsimple cxar sola, fakulo pri ties historio en tuta Francio, nun scipovas legi gxin.

Cxar ankoraux prava restas, post dekdu jaroj, la diro de Umberto ECO ke

"La historia-ideologia flanko de Esperanto restas absolute nekonata"

pro la kvazaux neekzisto de nacilingvaj verkoj pri gxi, kaj do de neesperantistaj historiistoj.

Mi sukcesis mencii nur Pascal ORY (sed ne pri la nuna temo kaj pro nur du pagxoj en sia pli ol 1000-pagxa verko, 1994), kaj titolis cxapitreton : "Jusqu'à la fin du XX<sup>e</sup> s. : Quasi-inexistence de la recherche historique française".

**Kian fakan gvidadon** vi ricevos pri la temo?

6 *The Esperanto Language as a Literary Medium*, Bloomington : Indiana University, 1971, 436 p.

7 Laux lia mesagxo, 26-10-05.

8 Clermont-Ferrand : Faculté des Lettres et Sciences humaines de l'Univ. Blaise-Pascal, 1995, 132 p.

9 "La vizito al kard. Colombo", en *Espero Katolika* n-ro 630, 9-1972, p. 121-123.

10 Itallingva letero je 2-5-1989 al la IKUE-prez., tradukita en EK n-ro 819, 10-1989, p. 164.

11 Tezo pri politikaj sciencoj *Il movimento esperantista cattolico in Italia*, 1974.

Mia DEA-esplordirektoro, Patrick CABANEL, Profesoro ankaux cxe Institut Universitaire de France, havis la humilecon rekoni ke li malmulton sciis pri Esperanto, kaj skribis :

" (...) Je n'ai pas envisagé de diriger la thèse de M. Lavarenne, alors que son sujet m'intéresse vivement, dans son seul intérêt : le professeur Lescure, de l'université de Grenoble, a lui-même soutenu un mémoire d'HDR [habilitigo] sur l'histoire de l'espéranto, et c'est à lui que revient de diriger M. Lavarenne avec toute l'autorité et le profit attendus."<sup>12</sup>

Do mia nuna esplordirektoro klare estas la plej tauxga en tuta Francio, laux tute sperta profesiulo.

Prof. Lescure dedicxis jam pli ol 100 pagxojn al :

5.I.2. Symboles espérantistes (p. 358-361)

5.I.3. Le culte de la personnalité de Zamenhof (p. 361-365)

5.II.2 Neutralité et pacifisme (p. 396-410)

5.II.3 L'utopie (p. 410-417) ; kaj cxefe :

6. Répondre à des préoccupations religieuses et mystiques (p. 423-492)

I. La langue universelle, étape vers une religion de l'humanité ?

1. Dépasser la malédiction babélique

2. Le Hillélisme

3. Des propositions religieuses mal acceptées

4. Vers "l'idée interne"

II. Espéranto et catholicisme (kie cetere li afable agnoskas : "Les paragraphes qui suivent doivent beaucoup au travail mené par Christian Lavarenne (...)".)

III. La Franc-maçonnerie et l'Espéranto

(Tiu lasta parteto III alportas ion informe novan cxar li povis konsulti framasonan arkivon en Parizo.)

Mi tamen esperas reviziti Claude Gacon en La Chaux-de-Fonds kaj ricevi ankaux de li kelkajn valorajn konsilojn, kaj jam rilatis kun cxiuj religiaj aux spiritaĵoj, ateistoj, framasonoj (pli malfacile), ktp.

**Kion novan vi esperas malkovri?**

Mi kun miro jam malkovris ke almenaux 56 kardinaloj iel esprimis sian favoran sintenon al Esperanto kaj, kiel jam sciante, cxiuj ok papoj ekde Pio la X-a gxis Johan-Pauxlo la II-a ; kaj mi versxajne sukcesos trovi ankoraux kelkajn pliajn kardinalojn ?

Mi sxatus, sed sen granda espero, malkovri suficxe nedubeblan konfirmon ke la nuna Dalai-Lamao kaj la antauxa Pancxen-Lamao (n-ro 2 de la sama budhisma tradicio) akceptis (ambaux en 1956<sup>13</sup>) farigxi Patronoj de BLE, la *Budhana Ligo Esperantista*, por provi konfirmigi tion al la Dalai-Lamao mem (kvankam unua provo de BLE-vicprez. malsukcesis en 2002, kiel mi klarigos en mia pli-detaligita skriba kontribuo al la Esperantologia Konferenco en Vilno). Sed tio estas historie grava punkto nur pro la eventuala tuja efiko sur neesperantistan publikon pro ia nuna modo favora al budhismo.

Mi povus fari longan liston de esperataj malkovretoj. Ekzemple, se gxi ne estas jam publikigita en lia esearo aux aliloke (mi nun ne havas tempon kontroli)<sup>14</sup>, mi sxatus trovi la tekston de la prelego de Waringhien cxe la munkena UK (1951) : "La ideologia dramo de Zamenhof" (eble gxi kusxas cxe la W-arkivo de Kvinpetalo en Bouresse ?)

Iom pli profunde mi esperas **montri ke**, sendepende de la religio aux nereligia ideologio kies anoj

12 El lia "Attestation", 12-12-2004.

13 Strange, eble nur erare, aperas en *Eo en persp.* p. 531, bedaŭrinde sen fontindiko : "Dalai Lama kaj Pancxen Lama akceptis en 1956 resp. 1957 esti patronoj de B.L.E." Laux tiama n-ro 618 de *Esperanto*, p. 86, sxajnas ke ili *samokaze* "volonte akceptis", la 9-an de decembro 1956. (Aux cxu, eble, ne nur parole sed ankaux skribe poste ?)

14 Mi ne havas *Li kaj ni* cxe mia biblioteko.

ili ofte estas, esperantistoj havas – pro la interna ideo aux pro personaj spertoj dank'al Esperanto – pli toleran kaj largxaniman sintenon al la aliuloj (esperantistaj kaj neesperantistaj). Kaj ke tiel, ecx se tio versxajne ne multe influis la amasojn, **esperantistoj ofte estis avangardaj** ne nur pri pedagogio (laux J.C. Lescure) sed **pri la gxenerala unuecigxa tendenco de la homaro**.

Mi montris tion pri kristana (kaj ecx iomete transkristana) ekumenismo en mia unua disertajxo (1987), al kio oni povas aldoni ekzemple, pro la cxi-jara centjarigxo, ke la jud(deven)a Zamenhof cxeestis la unuan internacian meson kun esperantlingvaj kantoj, en Boulogne-sur-Mer.

**Avangardaj ankaux pro sia malfermigxo al aliaj kulturoj kaj religioj** : ili estas forgesitaj, ekzemple, en la verko de mia amiko kaj konata sociologo Frédéric LENOIR, en lia 393-pagxa *La rencontre du Bouddhisme et de l'Occident*<sup>15</sup>. Esperantistoj versxajne ne estis la unuaj okcidentaj budhistoj, sed estis inter aux tuj post ili. Kaj tio povus farigxi interesa malkovro por la nunaj budhismemuloj.

Indus plu esplori, ekzempe, pri la esperantist(et)eco de la cejlona fondinto (en 1950) kaj unua prezidanto (mankanta en la indekso de *Eo en persp.*) de la suficxe grava (aux ecx plej grava ?) *World Fellowship of Buddhists*, kies Gxenerala Konferenco en Katmanduo (ankaux en 1956 : tuja 50-jarigxo) vocxdonis rezolucion favoran al la uzo de Esperanto.

**Kian historian demandon ghi prilumos?**

Oni devas rekoni ke Esperanto estis ide(al)o antaux ol farigxi lingvo. Oni do povas prilumi laux la "internidea" vidpunkto la historion de Esperanto, skize pli malpli jene.

Unue estis preskaux religia ideo pro konata persona sperto (letere rakontita de Zamenhof mem), kiun li nur poste esprimis kiel hilelismon. Pro evoluo aux taktikaj kialoj li sxangxis gxin al homaranismo, iomete pli facile akceptebla cxar teorie malfermita ankaux al ateistoj ("Dio", ekzemple, malaperis farigxante "Forto"). Homaranismo ne sukcesis sed iel naskis la "internan ideon", ne difinitan nek tro precize priskribitan, tiel evitante malkonsentojn. (Gxis nun, nenio nova.)

Tiam farigxis, laux mi, ne du sed kvar fluoj (eble mi elpensos aliajn terminojn pli tauxgajn) :

- la "(strategie ?) teknika" sub la franca racia influo : nura komunikilo, kun la idista skismo kiel ekstremo (skismo eble pli ideo ol lingva ?)
- la "konkreta kaj tuja", kun naskigxo de UEA
- la "socie progresema", aux ecx revolucia, kun naskigxo de SAT
- la "paca kaj spiritualema", kiu ne sukcesis esprimigxi per aparta asocio, kaj do sxajne malaperis samtempe kun homaranismo sed fakte sencxese resxprucas, ekzemple en la poezio kaj en dekoj da pli malpli efemeraj movadetoj kaj religiaj E-sekcioj (plej ofte *sxajne* peresperantaj) :

fondo en 1908 de *Bulteno de "Libera penso"* (Int. soc. esp. de liberpensuloj) (cxesis en 1914)

fondo de IKUE en 1910 (aux ecx 1909)

fondo de Teozofia Esperanta Ligo en 1911 (aux 1910 ?) kaj de la gazeto *Espero Teozofia* en 1913

fondo de KELI "en 1911" (fakte 1913)

fondo de la gazeto *Homaro* en 1912, kaj de "Universala Framasona Ligo" (UK Bern 1913, post unua "Esperanto framasona", fondita en Boulogne en 1905)

bahaanoj disvastigis E-on (ekde 1913 ?) kaj Lydia Zamenhof farigxas bahaanino (cx. 1926)

fondo de Kvakera Esperantista Societo en 1921

fondo de Universala Esperantista Pacifista Ligo, en 1923 (prez. Julia Isbrücker)

fondo de efemera "Esperantista Kolportista Asocio" (kvakero Livingstone Jenkins, 1923)

Onisaburo Deguchi (kunfondinto de Oomoto) fondas "Universala Homama Asocio" (1925), kun Euxropa Oficejo en Parizo (1925-1932)

ankaux en 1925 fondigxas en Pekino Universala Ligo de Religioj (laux instigo de Oomoto)

fondo de la "Interniario" (de Jenkins, Londono, en 1926 ?) (kun Budhana Rondo)

<sup>15</sup> Paris : Albin Michel, 2001<sup>2</sup>.

fondo de Budhana Ligo Esperantista (julio 1926)  
fondo de (pola) "Mariavita Rondo Esperantista" en 1927, "Mariavita Esperantista Ligo" en 1931  
Interreligia Konferenco por la Paco en Hago, 31.7-2.8.1928 (cxeforganizantino J. Isbrücker)  
Universala blanka frataro aperigas E-tradukojn ekde 1928  
fondo de gazeto *La rozumata kruco* en 1928 kaj de "Ligo supernacia de la rozkrucaĵoj"  
fondo de "Internacia Metodista Ligo Esperantista", en 1929  
fondo de unua E-sekcio de Martinus-kosmologio, en 1943

post la milito :

fondo de "Esperanta unio de liberalaj religianoj" en 1946  
"Internacia Kvakera Frataro" (Jenkins) kiu baldaux farigxas "Internacia Kristana Frataro"  
fondo de "Int. Grupon esperantistan de morala rearmado", en 1951  
fondo de (efemera ?) Esperanta fako cxe Universala religio, en 1956 en Argentino  
fondo de "Societo Evangelio Spiritismo Esperanto", en 1956 en Brazilo  
Islama Koresponda Rondo, poste, fondo de "Tutmonda Islama E-Asocio" cxe UK en Varsovio en 1959  
fondo de E-Societo de Mondo-mesianismo, en 1960 en Japanio  
fondo de IRKE (Inter-Religia Kunveno Esperantista) cxe UK en Helsinki, en 1969  
ktp.

Se la nuna UEA iel herede ricevis la "(strategie ?) teknikan" fluon – ni skize diru : okaze de la kunfandigxo kun IEL kiu kanaligis gxin – , tio samtempe ankoraux plifortigis gxian neuxtralecon ; kaj i.a. Ivo Lapenna provis malsektecigi la membrojn por pli granda efikeco al la ekstera publiko kaj gravaj institucioj (Unesko), ekz-e per la *Principaro de Frostvallen* (1956).

Sed tiam necesa propagandcela purigo eble iom post iom forpusxis esperantistojn dezirantajn iel esprimi sian internan ideon kaj tutsimple gxui sian esperantistecon, kaj bremsis spontanee disvolveton de ia popola esperantista kulturo, identeciga.

Tial la rauxmisma reago kaj la posta naciismece esperantista Civiteto, kiu estas stranga avataro, cxar senteritoria, de cxiam emo de unopaj esperantistoj grupigxi en unu sama loko por pli malpli komunume vivi kaj cxefe povi uzi Esperanton en sia cxiutaga vivo.

Mi malkovris pli ol cent tiajn projektojn en unu jarcento, do averagxe po unu projekto cxiujare. Kompreneble preskaux neniuj realigxis, kiel el pli ol 600 lingvoprojektoj naskigxis malpli ol dek ekvivetintaj lingvoj. La nuraj socienkarnigxoj de la lingvo gxis nun okazis en unuopaj familioj ; sed eble la nuna AIS-projekto pri nevirtuala universitato estas i.a. ankaux esprimo de simila emo.

Mi sxatus diskrete montri ke la kvar fluoj plus la pli eta "logxkomunuma emo" devenas, nur laux diversaj manieroj, el la sama diversaspekta interna ideo aux natura esperantista emo :

Iuj deziras disvastigi la uzon de sia lingvo plej efike kaj elektas la strategie neuxtralan teknikan utilecon (poresperanta agado)

Aliaj deziras jam utiligi gxin (peresperanta) : - por pli justaj socio kaj mondordo

- por pli spirita (paca, amika...) mondo

- aux por propra gxuo - cxu kultura (tuja)

- cxu praktike en la cxiutaga vivo

(Oni vidas ke la du lastaj pli malpli respondas al la "konkreta kaj tuja" fluo, kiu partete forlikigxis el UEA.)

Sed cxiuj fakte tamen estas samideanoj kaj la limoj ne plu estas (se iam estis) precizaj inter la pura disvastigo de la lingvo kaj la batalo por lingvaj rajtoj (ambaux, ekzemple, nun sxajnas esti UEA-

celoj) aux la (ekzemple semajno de) amikeco inter la popoloj (ankaŭ subtenata de UEA), aux la serio Oriento-Okcidento (kaj originala literaturo).

Nur la cxiutaga esperantista vivo eble sxajnas "politike nekorekta" (mi ne parolas pri la hereza cxar senteritoria Civito) : cxar oni vidas en daŭra samloka vivado de malsamlingvaj esperantistoj dangxeron krei novan nacieton dum probable temus pri centro(j) de internacia kulturo kien, ekzemple, cxiu E-lernanto povus kiam ajn (ne nur dum po unusemajnaj UK-oj jare) veni por "lingva mergigxo". (Mi tamen prefere ne eniru la *us*-historion sed restu cxe la *is*-historio, pli tradicia.)

El la kvar fluoj la tri unuaj jam pli malpli havas siajn historiojn pro la daŭra ekzisto de la du asocioj kiuj nun kanaligas ilin, UEA kaj SAT. Mi do intencas esplori pli pri la malpli konata "paca kaj spiritualema" fluo (kaj, aldone, pri la "logxkomunuma emo" ?), en kiu mi inkludas ankaŭ nereligiajn ideologiojn, ekzemple : liberpensado, E-Asocio de Humanistoj (kvankam W. Simcock klarigis ke gxi ja "havas nenion komunan kun religioj"<sup>16</sup>), ATEO, ktp.

Jen, ekzemple, enhavtabelo de la tria parto de mia antaŭa plano :

### III-1. judaïsme et dérivés

III-1.1. Hillélisme, homaranisme et néo-homaranisme(s) (Homarana Asocio, Ligo Humanitas...)

III-1.2. "idée interne", et utopies communautaires, ou tendances identitaires (Civito)

III-1.3. judaïsme, et OKEJ

### III-2. christianisme

III-2.1. catholiques (IKUE) : relations avec la hiérarchie (lente reconnaissance)

III-2.2. protestants (KELI), études bibliques (IABO), œcuménisme (TEL)

III-2.3. orthodoxes (TOLE) et groupes minoritaires (KES, Mariavites, UUES, LBV, PEM...)

### III-3. autres religions ou philosophies

III-3.1. orientales

III-3.1.1. shintoïsme : Oomoto (EPA)

III-3.1.2. bouddhisme (BLE, ùEA)

III-3.1.3. hindouïsme, yoga, méditation, (végét. : TEVA), (taoïsme : UTSLE)

III-3.2. islam (IKRo, TIEA, TIME, UIEA), et dérivés (Foi baha'ie : BEL)

III-3.3. groupements non religieux

III-3.3.1. MSN, Martinus-kosmologio, AU, Amikaro Bruno Gröning, spirités

III-3.3.2. RADE, francs-maçons, théosophie, Fraternité blanche universelle, rosicruciens

III-3.3.3. comparatistes (ASISTI), humanistes (EAH), libres-penseurs, athées (ATEO)

(Al tio mi aldonus la pac-movadojn.)

Kaj kompreneble mi forte insistus pri la kvanta kaj idea malgraveco de cxiuj cxi grupetoj kompare kun la tri aliaj fluoj. Mi sxatus klare montri ke trans cxiuj religiaj aux aliaj diferencoj, kaj malgraŭ uzo de aliaj vortoj (ekz-e "kamaradoj" inter SAT-anoj), plej ofte cxiuj iel sentis sin ne nur samlingvanoj sed ja samideanoj kun cxiuj aliaj esperantistoj (kun esceptoj kiuj estos studindaj : konfliktoj, kaj ecx procesoj).

Kaj mi emas opinii (sed mia esplorado eble ne konfirmos tion), ke ecx la peresperantaj movadoj gxis nun plej ofte restis tamen cxefe poresperantaj (ecx se tio riskas malplacxi al iuj esperantistoj).

Mi klarigas : malproksima celo de multaj E-sekcioj de neesperantistaj organizoj teorie estas ja servi dank'al internacia lingvo la celojn de sia organizo (ekz-e diskonigi kristanan, budhanan instruojn ktp.), sed ilia tuja pasxo al tio – kaj do ofte daŭra cxefa celo – estas unue kreskigi la E-sekcion mem.

Do, ekzemple, IKUE varbus pli, laŭ mia nuna vidpunto por IKUE ol por katolikismo (kvankam povas ja temi pri ambaŭ samtempe).

### **Avantagxoj kaj riskoj por la elekstera bildo de Esperanto**

Se la eventuala (sed esperata) doktora tezo estus eldonita kaj diskonigita ekster la malgrandan

rondeton de la universitataj historiistoj kaj aliaj fakistoj kiuj senprobleme komprenos ke temas pri historio de nur specifa parteto de la E-movado, la gxenerala publiko riskus, cxefe se gvidata en sia opinio per lertaj kaj (intence ?) neobjektivaj jxurnalistoj, ligi Esperanton kun "sektoj" aux ecx pensi ke cxiuj esperantistoj konsistigas ian sekton. (Sed ni ne revu : tia verko bedauxrinde ne multe riskas tiel vastan diskonigon.)

Aliflanke, laux nuntempa pensmaniero, homoj gxenerale emas esti kontraux "la ununura penso" (france : "*la pensée unique*"), ecx ene de aparta movado.

Do montri ke ne estas nur unu E-asocio (ekzemple UEA) sed sxpruca bolado de E-vivo kun tamen, trans cxiuj ideologiaj diferencoj, ia komuna sento kaj ecx ofta emo pli malpli kunlabori almenaux al la diskonigo de Esperanto, tio povus naski aux kreskigi simpation al la esperantistoj sen necese subfosi la seriozecon de la plej granda parto de la movadanoj.

La fina efiko multe dependos de la prezento, sen preskaux mensogaj troigoj sed laux kiel eble plej ekvilibra ("objektiva") maniero. Por tiuj kiuj scipovas legi la francan mi aldonas, kiel ekzemplon, la konkludon de mia DEA-parto pri la sinteno de la katolika hierarkio al Esperanto :

-----

## Conclusion

La hiérarchie catholique, au moins à travers les exemples qui nous ont été rapportés (car on relève ici ou là des traces d'oppositions, sans parvenir à vraiment en identifier les sources), semble avoir été dès le début plutôt bienveillante envers l'espéranto, du moins pour les quelques membres qui avaient eu connaissance de son existence et malgré certaines suspi-cions de lien avec la franc-maçonnerie.

Le net soutien de deux archevêques français (LANGÉNIEUX et RENOÜ) puis surtout de PIE X (grâce à Mgr GIAMBENE) a certainement exercé une influence bénéfique dans la lente et difficile constitution d'une association internationale de catholiques espérantophones, qui n'ont jamais été très nombreux.

L'amicale fidélité (cardinal GERLIER) et même l'engagement de certains évêques (ELTSCH-KNER, MACHEINER, LERCARO, MIZIOLEK, VLK, OTCENASEK, JAKUBINYI), conjointement avec le discret appui de tous les papes, exprimé presque chaque année par une bénédiction apostolique à l'occasion du congrès annuel de l'association, et l'existence d'une modeste revue le plus souvent mensuelle et de brèves émissions hebdomadaires à Radio Vatican, a fini par donner une certaine surface à l'IKUE.

La tradition des chants et prières en espéranto a abouti, dans le bouillonnement du concile Vatican II, à la célébration dans cette langue de messes à peine tolérées par le Vatican puis finalement officialisées au bout d'une longue et difficile procédure, un quart de siècle plus tard, grâce à l'appui du seul pape qui se soit engagé pour l'espéranto. Les catholiques espérantophones lui doivent sans doute aussi la reconnaissance presque simultanée de l'IKUE comme association privée internationale de fidèles.

Mais le déclin de la pratique religieuse et le désintérêt des occidentaux pour l'espéranto n'ont pas permis à ces soutiens, restés modestes sans doute en raison de la taille même de cette association, d'enrayer une décroissance perceptible (sauf dans quelques pays comme la Tchécoslovaquie), en particulier en France dans les vingt ou trente dernières années du siècle passé.

Nous nous trouvons donc confronté à une situation légèrement paradoxale : celle d'une reconnaissance, par une autorité officielle extérieure au mouvement espéranto, d'un groupement catholique resté quantitativement presque inexistant.

Nous serions tenté de conclure sur ce commentaire de Carlo SARANDREA, rédacteur d'*Espero Katolika*, à l'occasion des premiers vœux publics annuels de JEAN-PAUL II en espéranto juste avant la bénédiction pontificale *urbi et orbi* (Pâques 1994) :

"De toutes manières, nous pouvons dire en toute certitude que l'espéranto n'a pas reçu un soutien d'une telle valeur, et en même temps si permanent à travers les années, aussi bien en paroles qu'en actes, que dans l'Eglise catholique. Les Papes ont toujours regardé avec amour le mouvement espérantiste..."



Mais si pour lui il s'agissait d'une affirmation pure et simple, elle sonne à nos oreilles plutôt comme une question posée au chercheur, question à laquelle nous ne sommes pas actuellement en mesure de répondre, n'ayant pas d'éléments fiables de comparaison car nous n'avons pas encore entrepris l'étude systématique d'autres mouvements ou milieux et de leurs relations avec des organismes officiels (instances éducatives, UNESCO...) : ce sera l'un des objets de notre thèse.

En tout cas, l'IKUE semble avoir réussi à obtenir, ce qui n'est déjà pas rien, un succès... d'estime.

-----

Mi esperas ke mi pli malpli kontentige respondis al viaj demandoj, kaj petas vin ke vi bonvolu senkulpigi min cxe la kunsido de la Esplora Komitato pro la iom tro hasta verkado de tiu cxi prezento. Mi foriros morgaux por festi kristnaskon kun la familio de mia frato en Tuluzo, kaj do devas sendi cxion nun.

Mi tamen planetas eventuale reveni cxi tien tuj post kristnasko antaux ol denove foriri al La Rochelle (cxe alia frato) kaj apud Limoges. Se vi legas la dosieron antaux la 26-a vespere kaj vidas ke mankas io, aux sxatus ricevi klarigon, bonvolu sendi mesagxon al mi, ke mi provu arangxi tion.

Antauxdankon, kaj bonan kristnaskon !

Amike

*Christian Lavarenne*

PS Mi sendas *Curriculum Vitae* kaj listo de verkoj en aparta dokumento ("ESF CV.rtf") kaj skanajxon de studentkarto ("ESF carte d'étudiant hist.jpeg").